N-o 4. **BULTENO** 1937. 2. VI.

**DE ESPERANTO-ASOCIO EN ĈSR.**

*Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám. 447. Telefono n-ro 718-41.*

*Redaktas : ST. KAMARYT.*

*Senpage por membroj de Esperanto-Asocio en ĈSR. Aperas sesfoje dum la jaro.*

# Nia Esperanto-Tago en Uherské Hradiště fariĝu granda sukceso!

Moravia Slovakio, la regiono de kolororiĉa folkloro kaj de vigla, temperamenta popolo, kore invitas vin al partopreno en la

**dutaga esperantista manifestacio,**

**kiun aranĝas la 3—4-an de julio 1937 EAĈSR kun Slovaka Esperanto-Klubo en Uherské Hradiště.**

*Programo*:

Sabaton la 3an de julio 1937 je la 20 h: Amuza vespero kun belarta programo.

Dimanĉon la 4an de julio 1937 je la 9 h:

Laborkunveno pri temoj:

1.) Instruado de Esperanto en publikaj kursoj.
2.) Instruado de Esperanto en lernejoj.
3.) Turismo.
4.) Signifo de nombro en la organizo.

Je la 14 h: Komuna vizito de la ekspozicio.

*

Tiu ĉi bela slovaka urbo ekbrilos baldaŭ per miloj da abundkoloraj popolkostumoj de l'moraviaj Slovakoj, kiuj amase venos tien por plivigligi per siaj dancoj kaj melodioj la sferon de feste ornamita slovaka metropolo okaze de la Ekspozicio de mor. Slovakio.

La grandsignifa regiona entrepreno meritas jam nun grandan atenton de ĉiuj ĉeĥoslovakoj. Ne nur pro tio, ke ĝi donos tutan superrigardon pri la kultura, ekonomia kaj sociala problemoj de tiu slovaka regiono, sed ankaŭ tial, ĉar tie vidiĝos la ĉarmo de nia ĉiuspeca nesuperebla popolarto.

En koncizaj trajtoj ni priskribos nun la kadron de la ekspozicio, ĉar estas necese konatiĝi kun la gvidaj ideoj, regantaj tiun ĉi rimarkindan entreprenon, al kiu donis sian protekton nia altŝatata prezidento d-ro E. Beneš. Jam ĉi lasta fakto pruvas, ke la Ekspozicio de mor. Slovakio estos de eksterordinara graveco. Ĉiu el ni povas rajte atendi, ke ĝi plene kontentigos la postulojn de la nuntempa ekspozicio-vizitanto.

Antaŭ ĉio la ekspozicio donos kompletan bildon pri la pasinta kaj nuna vivo de la slovakoj. Ili aperos multnombre en siaj festaj kostumoj okaze de la popolaj festoj la 4., 5., 6-an de julio kaj ĉiutage en malpli gravaj aranĝoj. La tuto fariĝos vera spektaklo de vivanta mozaiko, kiu kalejdoskope varios en diversaj aranĝotaĵoj antaŭ ĉies okuloj. Ja mor. Slovakio estas regiono, en kiu spite malfavorecon de la tempo kaj malgraŭ la rapide enpenetranta moderneco konserviĝis ĝis nun preskaŭ ĉiuj kostumtipoj, entute 28. Reprezentantoj de ĉiuj tiuj tipoj aperos, eble lastfoje, antaŭ la publiko por montri siajn tradiciajn kutimojn, kiuj jam malaperas. Por vidigi al ĉiuj la malnovan vivmanieron kaj unikajn esprimkapablojn de l'arta kreopovo de la slovakoj, oni elmontros tie kelkajn tipajn ĉambro-internaĵojn, kie laboros slovakaj brodistinoj, pentristinoj de paskoovoj, teksistoj, potistoj, pankorbistoj kaj matistoj. Ĉio aspektos tute nature, plenreale kaj la impresoj estos senperaj. La multflanka varieco de la ĉiutaga vivo de la slovakoj reaperos tie kiel valora dokumento pri la granda kreopova forto de nia popolo.

Jen la dinamika parto de la ekspozicio. La statika montriĝos precipe en la slovaka muzeo, enhavanta altvalorajn ekspoziciaĵojn pri la folkloro kaj entuta kultura vivo de la slovakoj.

Ora najlo de la ekspozicio, kiu alviciĝos al la folkloro, estos bildgalerio de la verkoj de slovakaj belartistoj, kiuj havas grandajn meritojn pro la arta eternigo de la motivoj el la vivo de niaj slovakoj.

Se en eksterlando, precipe en Parizo, montriĝas granda intereso pri nia ekspozicio, tio fontas el la fakto, ke jam antaŭmilite la slovakojn disfamigis la senmortaj bildoj de nia genia interpretisto de la slovaka folkloro, Joža Úprka.

Estis li kaj liaj altnivelaj artverkoj, kiuj enpenetris ĉien, kie oni ŝatis la senperan, nekutiman belecon de io ĝis nun tute nekonata. La bildoj kiel „Pilgrimfesto ĉe s-ta Antonio" kaj „Reĝoj la rajdistoj" estas brilaj ekzemploj pri la granda talento de Joža Úprka.

Kompleta verkaro de lia paletro certe allogos ĉiujn artamantojn, eĉ tiujn, kiuj malakceptas la arton de lia pentra skolo. Cetere oni ne povas bone imagi, ĉu la modernistoj sukcesus per siaj esprimebloj sur-

toliĝi la vivantan kolorabundecon de la kostumoj tiel, kiel faris Úprka kaj liaj epigonoj.

La Ekspozicio de Mor. Slovakio donos bildon ne nur pri la folkloro, sed ankaŭ pri ĉiuj aliaj vivproblemoj de sia teritorio. Ĝi montros, kiel evoluiĝis mor. Slovakio ekonomie kaj industrie, kiel ĝi kreskis kulture kaj kiajn elstarajn personojn ĝi donis al la ĉeĥoslovaka nacio kaj mondo. Tion oni ekvidos precipe en parto „La pioniroj kaj gvidantoj de mor. Slovakio". En retrospektivo, kiun reprezentos diversaj dokumentoj, memoraĵoj, artverkoj ktp. oni konatiĝos kun la historio, politika kaj kultura movadoj, kun verkoj kaj sortoj de ĉiuj grandaj spiritoj de mor. Slovakio.

Unu el la rimarkindaj ekspozicio-partoj estos ekz. la epoko de la Grandmoravia regno, komencoj de la kristana kulturo, estiĝo kaj historio de la cirilo-metoda ideo. Kiel evoluis eklezia arto precipe tiu de la popolo, montros alia dokumentaro.

Alifianke oni vidos, kiel partoprenis Mor. Slovakio en reformacio kaj ribelo de Bílá Hora. Ĉi tie oni ekvidos la grandegan laboron de J. A. Komenský por nacia kaj tutmonda civilizacio. Tuj apud li elstaros la giganta personeco de T. G. Masaryk, kiu estas la plej granda filo de Mor. Slovakio kaj feliĉe ankaŭ de tuta nia patrujo. Ekspozicio pri liaj vivo kaj laboro estos la plej granda el ĉiuj ĝis nun aranĝitaj en Ĉ. S. R.

Oni rememoros ankaŭ la jubileon de alia granda slovako, la antaŭ nelonge mortinta dro Jan Herben, kiu estis fidela kunlaboranto de T. G. Masaryk.

Bildo pri politika historio der Mor. Slovakio estas kompletigita per rememoraĵoj je en- kaj eksterlanda ribelo precipe tiu en Kyjov kaj ĝiaj elstaraj reprezentantoj. (Gen J. Šnejdárek, kolonelo J. Jaroš, redaktoro J. Dýma k. a.)

Al la nomitaj reprezentantoj de la kultura kaj politika klopodado alviciĝas Tomáš Baťa, kies ideoj kaj laboro donis al granda parto de nia teritorio tutnovan aspekton.

Jenaj skizoj estas kompreneble nur mozaikaĵo de tio, kio plene realiĝos kaj kio montros la signifon de nia regiono por komuna penado idea kaj kultura de la tuta ĉeĥoslovaka nacio, kies plej grandaj filoj estas ĝuste mor. slovakoj. Ni ĉiuj ĝojas kaj fieras pro tio, sed ne haltos en laboro komencita. Ni scias kaj scios daŭrigi. Nia persistemo estas granda kaj daŭra. Jen la dolĉa kerno de la sukcesoj, kiuj akompanas nian laboron. Ja nur persisto kaj kunnaskita inteligenteco garantias daŭran prosperon de nia laboro, kiu volas esti elstara faktoro ĉe ĉiu kultura kaj utila entreprenado por bono de ĉiuj niaj fratoj ĉeĥoslovakaj kaj homaro entute.

*

En granda pavilono de Mor. Slovakia kulturo havos sian lokon ankaŭ Esperanto. La stando, kvankam modesta, enhavos kelkajn dokumentojn pri nia esperantista laboro, kiu festas sian 5 jaran jubileon. Por konservi la necesan linion de simpleco ni povos ekspozicii nur malmultajn esperantaĵojn. Tamen ni klopodas elmontri almenaŭ tiajn dokumentojn, kiuj bone atentigos pri la utilo kaj forto de nia internacia lingvo.

Kvankam Mor. Slovakio ne estas ankoraŭ prilaborita tereno por nia afero, tamen ŝajnas, ke la pozicio estas bona kaj grundo firma. Dum tiuj malmultaj jaroj, kiujn ni dediĉis al senĉesa propagando por nia afero, ni havis ĝenerale kontentigajn rezultojn. Sed nia ideo kaj arda deziro estas daŭrigi ĝis fina venko de nia idealo. Ĉu ni sukcesos? Jen la demando, kiun devos respondi ĉiuj gesamideanoj de nia lando.

Sciante, ke harmonia kunlaboro estas la plej efika faktoro en nia komuna poresperanta klopodado, ni la slovakaj esperantistoj decidis aranĝi en la kadro de la Ekspozicio de Mor. Slovakio Esperanto-Tagon kaj petas helpon kaj subtenon de ĉiuj bonvolaj samideanoj. *Sukceso de la E. T. en Uh. Hradiště estos la sukceso de nia tuta E-movado!*

Tial ne hezitu kaj senprokraste aliĝu al nia manifestacio, kiu okazos la 3.—4an de julio en Uh. Hradiště, la metropolo de Mor. Slovakio.

*Ĉiu dudeka aliĝinto ricevos senpage belan kaj valoran memoraĵon kiel premion!*

*

La partoprenantoj ricevos 50 proc. rabaton sur ĉiuj ĉeĥosl. fervojoj, kiu validos de sabato la 3an de julio ĝis merkredo la 7an de julio.

Oni nur devas sendi ĝustatempe plenigitan aliĝilon, pagi la kotizon kaj ricevos de SEK legitimilon, kiu rajtigos vojaĝi al kaj el Uh. Hradiště por rabatita prezo.

*Kongresa kotizo estas 15 Kč.* Ĉar ni sciiĝis pri la favora rabato nur antaŭ kelkaj tagoj, ni ne povis presigi sur la aliĝiloj, *ke oni alpagu al la kotizo pliajn Kč 4·—*, kiel pagotan sumon por la fervoja rabatlegitimilo.

Ĉar povas okazi, ke iuj ne uzos la ekspozician vojaĝbileton kun rabato, ni petas noti tion sur la aliĝiloj. Krom tio notu, se eble, la horon de via alveno. Nur sabaton posttagmeze atendos ĉe ĉiu vagonaro kostumita paro esperantista.

*Por pli efika propagando de la E. T. en Uh. Hradiště eldonis la SEK belajn dukolorajn glumarkojn. Ĉar ili ne venis ĝis unu el presejo, ni ne scias precize la prezon. Sed ĉiukaze ili ne estos multekostaj.*

*Interesantoj petu ilin ĉe Slovaka Esperanto-Klubo en Uh. Hradiště.* —db—

**Universala Esperanto-Asocio.** Provizora Ĉefdelegito por Ĉeĥoslovaka respubliko estis nomita s-ro František Slavík, Praha XIX., Uralské nám. 9. Li akceptas ĉiujn pagojn kaj donas informojn.

## Internacia Esperanto-Ligo, la paca armeo de internacia servado.

La antikvan devizon „Mi servas" povas meti rajte nia lingvo sur sian ŝildon. Ni estas prave fieraj pri praktika uzeblo de esperanto por ĉiuj servoj, kie aperas bezono de internacia kompreno.

Ni — esperantistoj en Ĉeĥoslovaka respubliko — ĉiam pli klare ol cetera mondo konsciis, ke estas la internacia organizo, kiu ebligas tiun servadon kaj tiel ankaŭ grave helpas la marŝon de nia afero. Tial ni ne hezitis doni al ĝi nian plej fortan subtenon.

Bezono de tiu subteno estas nun pli urĝa ol iam. La nuna serioza tempo ne permesas, ke staru flanke de la internacia organizo iu, kiu volas sin nomi esperantisto.

Post bona konsidero de ĉiuj cirkonstancoj eniris nia Asocio post la ceteraj naciaj societoj en la universalan organizon „Internacia Esperanto-Ligo" kaj ni nun plej insiste invitas niajn anojn, ke ili fariĝu ĝiaj aktivaj membroj. Devas ĉesi ĉiuj hezitoj, ĉu nin kontentigas ĉiuflanke la novaj aranĝoj. En la konvinko, ke ili estos pli bonaj, se ni kunlaboros, tuj ĉiu aliĝu.

Ni devas eniri la internacian trupon, kiu marŝas al la venko. En ĝi la ĉeĥoslovaka taĉmento devas montri siajn kvalitojn. Se ni per amasa aliĝado pruvos ankaŭ nian forton, ni havas rapide organizon, kiu respondos precize niajn dezirojn. Nia Asocio daŭre kaj zorge atentas la bezonojn de la movado. Ĝi atingos multon en la universala organizo, se ĝi povos sin en internacia tendaro apogi sur ŝultroj de forta brigado ĉeĥoslovaka.

Esperanto devas servi la internacian bonvolon. Ni, esperantistoj de Ĉeĥoslovaka respubliko, helpu porti komune kun la tutmondo tiun honoran taskon!

**Kotizo** de IEL estas pagota sur poŝtŝparkasan konton de Esperanto-Asocio en ČSR, Praha n-o 9602. Uzu eventuale blankopagilon, riceveblan en ĉiu poŝtoficejo por 5 hel. Vi ricevos tuj membrokarton, servokuponaron kaj la jam aperintan Jarlibron.

MJ — membro ricevanta Jarlibron — pagas 25 Kč;

MA — membro ricevanta krom la Jarlibro ankaŭ monatan revuon Esperanto-Internacia — 60 Kč;

MAH — membro ricevanta la Jarlibron kaj semajnan revuon Heroldo de Esperanto — 120 Kč;

MS — membro ricevanta krom Jarlibro kaj la monata revuo ankoraŭ valorajn librajn premiojn laŭ speciala listo — 160 Kč.

Por ĉiuj kategorioj pagas membroj de EAĈSR je 3 Kč malpli, do 22, 57, 117 kaj 157 Kč.

### La aŭtuna laboro de Ĉe-metodaj instruistoj en Ĉeĥoslovakio.

*En la lasta numero de nia Bulteno ni raportis detale pri la laboroj de la estona s-ano H. Seppik dum tiu ĉi vintra sezono kaj pri la instruado de lia edzino E. Seppik en nia lando. Ĉar la rezultoj de ilia laboro estis ankoraŭ pli efikplenaj ol dum la lasta vintro, intencas nia asocio inviti por la venonta aŭtuno ankoraŭ pluajn Ĉe-instruistojn. Estas nepre bezone prepari ĝustatempe ilian laborkampon, ni devas do jam nun scii, kiu urbo havas intereson pri ilia laboro. Ni alvokas ĉiujn samideanojn, ke ili jam nun skribu laŭ la adreso de s-ano* **Ing. L. Krajc en M. Ostrava** *VII—Vítkovice, Husitská 52, kiu transprenis afable de nia asocio la komision aranĝi Ĉemetodajn kursojn en nia respubliko, pri informoj, kaj sendu al li ankaŭ aliĝojn. Uzu multe la servojn de niaj talentaj eksterlandaj propagandistoj, precipe en la urboj, kie mankas intereso pri esperanto, kaj Vi ĝojos poste pro rezultoj. Ne timu! Vi venkos!*

---

### Tridek novaj lokaj grupoj? Ĉu Vi, samideanoj, ne forgesis?

*Ĉu vi memoras rekomendon de la kongreso? En 34 lokoj estas 3 aŭ 2 niaj membroj. En ĉiu el ili povas esti trovitaj pluaj 6 homoj emaj pagi po 16 Kč. Se Vi estos 8 en unu loko, Vi pagos al nia Asocio 8 oble 12 Kč, do restis al Vi por lokaj celoj 32 Kč, el kiuj Vi povos aboni por 15 Kč Ligilon por la Via grupo. La reston Vi havos por malgrandaj grupaj elspezoj, precipe afranko. Kaj certe troviĝos inter tiuj 8 organizemaj esperantistoj almenaŭ unu, kiu volos esti aktiva membro de IEL por posedi por 25 Kč la Jarlibron. Li povos anonci sin kiel delegito. Lia adreso aperos en aldona nomaro aperonta en aŭtuno kaj senpage tiam dissendota al membroj.*

**Anoj de la lokaj grupoj!** Ni hodiaŭ dankas ankaŭ al Vi pro kompreno pri signifo da la loka grupo esperantista. Pardonu, ke ni atentigas tiujn el Vi, kiuj ne pagis ankoraŭ Vian kotizon al la loka grupo, ke ili tion ne forgesu kaj ke ili ĝojigu sian kasiston per pago. La grupoj ja bezonas sumetojn de viaj kotizoj! Sed ni petas hodiaŭ ankaŭ tiujn nian anojn, kiuj pagas al ni senpere, kvankam en ilia loko ekzistas nia grupo: Aliĝu al tiu grupo! Ebleco partopreni amikajn kunvenojn de Vialokaj samideanoj kaj uzi la bibliotekon rekompencos al Vi la kelkajn kronojn de la kotizo. Primeditu tion, amikoj! Vi konsentos pri utileco de nia konsilo.

---

## Esperantista vivo.

La 3. V. 1937 mortis en Třebestovice s-ino *Terezie Vavrušová*, patrino de nia membrino Karla Vavrušová. Sinceran kondolecon!

Mortis la 17. V. 1937 en sia 71-a jaro advokato d-ro *Ludoviko Goldberger*, prezidanto de la Germana Esperanto-Grupo „Verda Stelo" en Praha kaj longjara meritplena laboranto por nia afero. Li estis

ankaŭ unu el la pioniroj de stenografio, kies lektoran oficon en la germana universitato de Praha li dum multaj jaroj posedis. Li estis membro de la ŝtata ekzamena komisiono por stenografio. La bonkora kaj ĉiam bonhumora samideano akiris ĉies koron kaj tial li havis nur amikojn. Ili nefacile adiaŭis lin la 20-an de majo en hebrea tombejo de Praha. En ilia nomo parolis antaŭ la tombo s-ro urba konsilisto Koutek. La funebran ceremonion partoprenis ankaŭ komitatanoj de EAĈSR. En nomo de la esperantistoj estis metita florkrono sur la tombon.

Laŭ noto sur reveninta Bulteno ni eksciis pri morto de malnova fidela samideano *Antonín Bartoš*, iam en Praha, nun depost pluraj jaroj en Podobora-Chotěbuz. — Liaj multaj amikoj konservos lian memoron.

## KRONIKO ESPERANTISTA EN ĈSR.

**Komerco.** Likvoron *Esperanto* vendas la firmao Bobula en Košice. Alia alkoholaĵo kun nomo *Verda Stelo* estas fabrikata jam depost jaroj en Praha-Žižkov de Emil Dynybyl. En Praha estas vendata pulvoro por harlavado nomata *Bonega*. Ni ne povis konstati, kiu estas la fabrikanto. Praktikajn pordoŝildojn kunmeteblajn kun la esperanta marko *Nomo* fabrikas Josef Levitus, el Praha II., Petrská 18. Estis interese aŭdi de s-ro Levitus, kiu ne estas esperantisto, ke li mem elpensis tiun vortomarkon, elektante inter multaj diverslingvaj tradukoj de la vorto „nomo“ kaj fine kreante tiun ĉi formon, kiu ŝajnis al li internacia. Li estis surprizita aŭdi, ke antaŭ li Zamenhof kreis tiun vorton sammaniere.

**Gvidfolioj, afiŝoj.** Urbestraro de *Jičín* eldonis grandan, tre belan afiŝon invitantan al vizito de la urbo esperantlingve. Ni klopodas, ke la afiŝo efektive pendu en multaj eksterlandaj urboj. — Urbestraro de Karlovy Vary aperigis novan eldonon de sia tre sukcesa faldita informa prospekto (16 paĝoj) tre riĉe ilustritan kun titolo *Mondfama kuracbanloko Karlsbad, Ĉeĥoslovakujo.* — E. K. en *Lázně Bělohrad* aperigis novan 4-paĝan prospekton de sia banloko kaj 4-paĝan prospekton pri la kursoj.

**Nacilingvaj ĵurnalaj anoncoj** de la banloko Lázně Bělohrad enhavas ĉie inter la nomaro de la atentindaĵoj de la urbo ankaŭ „Esperantista Libertempejo“.

**Pri nia Gazet-servo** skribis al ni Norvega Esperantista Ligo: „Entute ni iom post iom venis al la konkludo, ke la gazetservo ĉe vi estas unu el la plej bone organizitaj en la tuta mondo. Viaj diversaj klarigoj estas tre interesaj.“ Niaj kunlaborantoj akceptu dankon pro ilia helpo, kiu pravigas tiun ĉi opinion de norvegaj amikoj.

**En katolikaj pastraj seminarioj** en Praha kaj en Hradec Králové estas instruata esperanto al libervolaj interesantoj el la teologio-studentoj. En Praha instruas s-o Otto Mádr, en Hradec Králové Karel Filip.

**Regiona kunveno en Jičín 25. 7. 1937.** Okaze de la Ekspozicia foiro en Jičín kaj laŭ invito de ĝia direkcio kunvenos la orientbohemaj samideanoj en tiu pentrinda urbo la 25-an de julio por amika kunesto kaj por interkonsento pri plua laboro. Ĉiu estas sincere invitata al la kunveno, kiu certe inde daŭrigos la bonan tradicion de orientbohemaj konferencoj. Atendata estas ankaŭ vizito de la Ĉe-kursanoj el Lázně Bělohrad. Pluajn detalojn postulu — aldonante respondan afrankon! — de d-ro Frant. Vaněk, Dolní Bousov.

**La programoriĉa somero esperantista.**

3.—4. VII. Esperanto-tagoj en Uherské Hradiště.
25. VII. Regiona kunveno en Jičín.
25. VII.—1. VIII. Cseh-kursoj en Lázně Bělohrad.
5.—6. VIII. Antaŭkongreso en Praha.
7.—14. VIII. Universala Kongreso en Warszawa.
15.—25. VIII. Cseh-Kurso en Trenč. Teplice.

Pasigu la nunan someron esperantiste! Prezentiĝas okazo en plej diversaj regionoj, depost komenco de julio ĝis fino de aŭgusto.

## *Ricevitaj libroj kaj gazetoj.*

Librojn, ĉe kiuj estas notita prezo en Kč, liveros la Libroservo de EAĈSR afrankite por la notita sumo.

*J. V. Dolinský, Mluvnice a slovník slovensko-esperantský. Gramatiko kaj vortaro Slovaka Esperanta.* Vydal-eldonis Domov Speváckeho sboru slov. učiteľov, Trenčianske Teplice. 164 paĝoj 11x16 cm. En tolo bindita Kč 19·60. — Ni salutas kun granda ĝojo aperon de tiu ĉi verko. Slovakoj ricevas en ĝi unuan naci-ligvan vortaron. La vortaro estas ampleksa kaj relative tre detala. Oni trovos tradukojn eĉ de malofte renkontataj vortoj. Ni rekomendas akiron de tiu ĉi vortaro al ĉiuj niaj lokaj grupoj. Ankaŭ la ĉeĥaj samideanoj foliumos la libreton kun efektiva ĝuo.

*Jiří V. Šamla, Lidová učebnice esperanta.* Ĝusta prezo Kč 2·20 por afrankita sendo. Korektu en Bulteno n-ro 3.

**Plej simpla metodo por propagando** estas skribi ĉian sian korespondaĵon sur poŝtkartoj kun varba surpreso. Ĝi estas propagando, kiu al Vi nenion kostas, ĉar por poŝta poŝtkarto Vi devas nun pagi 10 helerojn. Kaj Vi ricevos de ni 100 diversajn poŝtkartojn por 10 Kč. Do por la sama prezo po peco. Estas nekredeble, ke ekzistas kluboj, kiuj ankoraŭ neniam mendis tiujn niajn kartojn. Tuj ili riparu sian forgeson! Mendu provizon kaj disvendu podetale al Viaj anoj! Sendu 10 Kč al la poŝtĉeka konto n-ro 9.602 aŭ 12.371 por Esperanto-Asocio en Praha! Vi tuj ricevos la poŝtkartojn.

| NIAJ PROPAGANDILOJ. | Prezo Kč |
|---|---|
| Ĉeĥa Ŝlosilo 1 ekz. | 1·20 |
| Slovaka Ŝlosilo 1 ekz. | 1·20 |
| Germana Ŝlosilo 1 ekz. | 1·20 |
| Poŝtkartoj diversaj 100 ekz. | 10·— |
| Jeden jazyk — ĉeĥa (8-paĝa propagandilo) 1 ekz. | —·20 |
| Jeden jazyk — slovaka 1 ekz. | —·20 |
| Všem přátelům (4 paĝa varbilo) 1 ekz. | —·10 |
| An alle Freunde 1 ekz. | —·10 |
| Statuto de EAĈSR 1 ekz. | 1·— |
| Afiŝo granda 1 ekz. | 2·10 |
| Afiŝo malgranda 1 ekz. | 1·80 |
| Glumarkoj 1 folio 84 ekz. | 4·— |
| Bulteno 1933-37 1 jarkolekto po | 10·— |

Disvastigu niajn propagandilojn, por ke ili faru la servon, por kiu ili estas preparitaj.

Se vi ne konas iun el ili, mendu almenaŭ po 1—2 ekz. por vi mem. Mendante almenaŭ por 20 Kč, vi ricevos 10% rabaton, por 100 Kč 20% rabaton. Monon sendu en poŝtmarkoj aŭ al nia poŝtĉeka konto.

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz esperantistů ČSR. v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík — Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. — Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933. - Podací úřad Praha 45.